FN PER ANC 47




# Normanda Esperanto-bulteno

BULLETIN TRIMESTRIEL. TRIMONATA BULTENO. Nº 6

--- DECEMBRO 1968 ---

==========================================================

Redaktas: S-ino J. VINCENT. Rue des Oiseaux -27- LES ANDELYS

Sendu la manuskriptojn antaŭ la 10-a de februaro, 10-a de majo, 10-a de aŭgusto kaj 10-a de novembro. ---

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

ENHAVO:

Paĝoj:
1: Bondeziroj
: Noto de la redakcio
2: Seminario en Grésillon
3: Vivo de la grupoj
4: Finnlandanoj en Normandio
Por la infanoj
Kial vi lernis Esperanton?
Kotiztabelo

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

FELIĈAN JARON 1969

AL ĈIUJ ! ! !

SANON! ! PROSPERON! ! PACON! !

==========================================================

## NOTO DE LA REDAKCIO.

Por ebligi pli akuratan aperon de la bulteno, la redaktorino petas, ke oni sendu la manuskriptojn antaŭ la 10-a de februaro, majo, aŭgusto kaj novembro. Tiam, ŝi povos pli facile ĝin prepari kaj ĝi aperos en marto, junio, septembro kaj decembro.

Dankon.

SEMINARIO POR KURS- KAJ GRUP-GVIDANTOJ GRESILLON BAUGE M & L

por la zono A: 16/23-2-69

por la zono B: 23-2/2-3-69

------

PROGRAMO

La seminario estiĝos en formo de forumo, en kiu ĉiu partoprenanto povos libere esprimi sian opinion pri la Esperanto-instruado, demonstri sian manieron instrui, pridiskuti la diversajn metodojn.

Estus tre dezirinde, ke ankaŭ lernantoj de diversaj Esperanto-kursoj partoprenu por helpi al pliviglig̃o de la demonstradoj.

xxxxxx

HORTABELO

8.00: ellitiĝo
8.30: matenmanĝo
9.30: prezentado de Esperanto-leciono
10.30-11.30: kritikado kaj diskutado
12.30: tagmanĝo

17.00: pristudado kaj kritiko de lernolibro
18.00-19.00: diskutado
19.30: vespermanĝo
21.00: demonstrado de grupkunveno

---

ALIĜILO

Tranĉu kaj sendu al S-ro Babin, 13, Bd de la Chauvinière 44-Nantes p.ĉ.k. Nantes 2813.61 antaŭ la 25-a de januaro 1969.

Nomo:

Antaŭnomo:

Adreso:

Mi aliĝas al la seminario por la zono A/B/ambaŭ

Mi kunprenos....infanojn.

N.B. Malpli ol 15-jaraj infanoj ne pagas aliĝkotizon. Pli ol 15-jaraj devas plenigi apartan aliĝilon kaj pagi aliĝkotizon (10 F).

Dato kaj subskribo:

VIVO DE LA GRUPOJ.

DOMFRONT. La Esperanto-grupo nun estas sekcio de la loka kulturasocio; okazis komunaj kunvenoj, en kiuj oni pristudis la organizon de someraj eventoj pri la 50-a datreveno de la turisma oficejo. Ĉiun dimanĉon en julio kaj aŭgusto, okazos speciala manifestacio. Eble la normandaj esperantistoj povus elekti unu el tiuj dimanĉoj por kunveni en Domfront?

Sendu viajn sugestojn al S-ro Véron 5, Place Petite Bruyère
61-Domfront.

LES ANDELYS. La kursoj funkcias regule, merkrede kaj vendrede por 7 knabinoj, ĵaŭde por 5 gesinjoroj.

La 14-an de decembro, okazis vespero pri:"Hispanujo kaj Turkujo, sunplenaj landoj." La 15-an, grupeto da gesamideanoj kune tagmanĝis kaj debatis -tute en Esperanto- pri la Homaj Rajtoj.

3 knabinoj jam aliĝis al la seminario, kiu okazos en Grésillon en februaro. Vidu pri tio la specialan paĝon. Bonvolu tre atent pristudi la programon. Oni ofte plendas en la grupoj, ke mankas taŭga instruanto: kaptu la unikan okazon! Ĉiu normanda grupo sendu minimume 2 membrojn al tiu seminario.

VIRE. Aperas artikolo de S-ro Legret aliparte.

YVETOT. La 2-an de oktobro okazis la Ĝenerala Kunveno. S-ro His, prezidanto, memorigis pri la historio de la antaŭa grupo. S-ro Pottier disdonis la diplomojn al la 5 laŭreatoj de "Atesto pri Lernado. Post legado de la diversaj raportoj pri la agado de la Centro dum la jaro, oni reviziis la statutojn sendotajn al la prefektejo por oficialigo de nia societo. En la nova estraro estas elektitaj: Prezidanto: S-ro His; sekretariino: S-ino Pottier; kasisto: S-ro Saunier; delegito pri informado: S-ro Nobis. Antaŭ ol disiri, oni decidis okazigi la 9-an de oktobro estraran kunvenon por organizi informan kampanjon kaj kursojn.

La 23-an de oktobro, post disdono de proksimume 100 afiŝetoj montrotaj en la vitrinoj, okazis la informa vespero. Antaŭ publika de pli ol 40 homoj, S-ro Bosc rakontis la historion de Esperanto kaj montris ties utilecon; S-ro Pottier demonstris ĝian facilecon. 15 personoj aliĝis al la publika kurso tuj post la kunveno.

Funkcias la jenaj kursoj: publika por komencantoj(S-ino Potti vendrede je la 20.30, 17 gelernantoj; publika por progresantoj (S-Pottier) merkrede je la 20.30, 6 gelernantoj; publika por infanoj (S-ino Pottier) ĵaŭde je la 10-a, 4 gelernantoj; por profesoroj de la duagrada lernejo (S-ro Pottier) merkrede je la 17.30, 7 homoj; elementa por lernantoj de C.E.S. (S-ro Pottier) ĵaŭde je la 9-a, 6 lernantoj; progresiga por lernantoj de C.E.S. (S-ro Pottier) ĵaŭde je la 10.30, 3 lernantoj.

Rimarko: 3 instruistinoj, el kiuj 1 lernejestrino, partoprenas la publikan kurson.

## FINNLANDANOJ EN NORMANDIO.

En julio, dum tri tagoj, mi akceptis du finnlandajn esperantistojn, G-roj Pystynen (kun iliaj tri infanoj). Ambaù estas instruistoj. S-ro Pystynen estas delegito de U.E.A. en Hamina. Ili vojaĝis aùtomobile tra Eùropo dum unu monato kaj duono vizitante multajn delegitojn.

G-roj Pystynen vizitis en Domfront S-ron Véron kaj la anojn de lia grupo. Al la Domfront-aj esperantistoj kaj al Vir'aj, li prezentis interesajn diapozitivojn pri sia lando.

S-ro LEGRET el Vire.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

## KIAL VI LERNIS ESPERANTON?

Ĉi tie ni malfermas liberan tribunon, kie ni enpresos la respondojn de niaj legantoj al la supra demando. El tiuj leteroj, la novbakitaj esperantistoj (eble ankaù la spertaj) certe eltiros bonajn argumentojn por konvinki aliajn lerni la lingvon.

Sendu viajn kontribuaĵojn ĝis la 10-a de februaro.

=====================================================================

## POR LA INFANOJ.

### LA METILERNADO ( daùrigo)

Francisko iros paŝti kun Mario, por alkutimiĝi la unuajn tagojn.
Mario scias multajn aferojn, kiujn bona ŝafisto devas scii.
Li montros al Francisko la plej bonajn "paquiers": la lokojn, kie la herbo abundas kaj kie la ŝafoj longe manĝas, kurante nek dekstren nek maldekstren, ne devigante vin kontroli la "damaĝojn", ne donante penon, kiel oni diras.
Mario ankaù montros al Francisko, kiel oni restas la tutan tagon kun siaj bestoj ne travante tempon enui.
Kaj Francisko ankaù estos unu el tiuj etaj ŝafistoj, kiuj ne vidas, ke la ombro atingas la pinton de la Granda Monto, kaj ke necesas rapidi por reiri al la vilaĝo antaù la nokto.

( daùrigota)

=====================================================================

## KOTIZTABELO.

Union des Espérantistes de Normandie. . . . . . . . . . . . . . L 2 F
Kasisto: S-ro E. Jouis p.ĉ.k. Rouen 283-40 E

U.F.E. (kun "Revue Française"). . . . . . . . . . . . . . . 30 F
U.E.A. (kun "Esperanto" kaj Jarlibro) . . . . . . . . . . 35 F
Fédération Normande des Centres Culturels Esperanto p.ĉ.k.Rouen 2348-06Z

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Dépôt légal: 1er trimestre 1969. La gérante: Mme J. Vincent.
Polycopié par le Centre Culturel et
d' Amitié Internationale Zamenhof 27-Les Andelys.